

UNIVERSITY OF CALIFORNIA

JUN 6 1939

INTERNACIA GAZETO

LA SIMBOLO



ESPERANTO



Jaro IIIa

MAJO, 1911

Num. 3a

SYMBOL PUBLISHING CO.

P.O. Box 1020, Tacoma, Washington, U.S.A.

ELIRAS MONATE

LA SIMBOLO

Abonprezo: enlande, Sm. 2,00; eksterlande, Sm. 2,50
Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista, London

Entered as second-class matter April 7, 1909, at the postoffice at Tacoma, Washington
under the Act of Congress of March 3, 1879.

ENHAVO

La Vilaĝanoj pri Tolstoj

La Lasta Usonano

Lumo

Pri la Hebrea "Tetragrammaton"

Kiel Bela Estas la Vivo

Pri Pilsen


Eklezio de l' Morgaŭo

Recenzoj

Sin turnu al

Symbol Publishing Co.,

Post Office Box 1020, Tacoma, Wash.



Ĉu ni ne similas al tia sama materialo el kiu la
sonĝoj naskiĝas ?

LA VILAĜANOJ PRI TOLSTOJ.

DE V. U. -- ESPERANTIGIS N. HRISTOSKOFF.

JEN ni estas en Zaseki. Tie ĉi li estis; tiuj konstruaĵoj, tiuj nigrantaj en la malproksimeco montetoj kaj vojo estas respeguliĝintaj en liaj rigardoj, — de hodiaŭ tiuj lokoj pleniĝos de paroloj pri li kaj fameco.

Mi ne povis stari en la stacio* pli ol duonhoron kaj pro tio, ke ĝi estis troplenigita de homoj, kiuj disvastigis malbonan atmosferon, kaj pro tio, ke io min logis tien, al la libera aero, kie komencis aperi grupoj da infanoj, virinoj kaj junulinoj, vilaĝanoj diversaĝaj, kiuj havis la feliĉon reflekti en si mem la vizaĝon de la Jasno-Polana'a instruisto: ĉiuj havis modestajn, seri-

*Astapovo.

ozajn ĝis malĝojo vizaĝojn kaj estas pretaj rememori kaj rakontadi kun plezuro pri ia travivaĵo, pri kio estus agrable ankaŭ al la rakontanto mem. La spirito de la eminenta maljunulo aperadis en la rakontoj de la diversaj grupoj en efektivaj formoj.

Ĉirkaŭ grupo da knabinoj kaj virinoj kolektiĝis rondo de adorantoj al la maljunulo. Ekportiĝis vortoj: "la vilaĝanoj de la tuta vilaĝo* venos pli malfrue renkonti la grafon. Ni ekrapidis veni pli frue. Ni timis, ke ni ne povus lin vidi je la lasta fojo."

"Ĉu ofte vi lin vidadis?"

"Jes, ĉiam. ... Iam ni iras en la arbaron de la grafo, kolektas lignojn, turnas nian rigardon, kaj li -- tie ĉi: la manoj defalas. Li pli multe penis sin kaŝi, por ke ni lin ne vidu. Kaj iam li proksimiĝas al ni kaj diras: 'Kial vi portas tian faskegon? Ĝi pezas, malutile estas, -- vi, pli bone, venu dufoje.' 'Ni timas,' ni diras al li, 'ke nin vidos la gardisto, li riproĉos nin.' 'Nenio estas,' li diras; 'ne timu; mi diros, ke neniu riproĉu vin.'"

"Kiam li estis viva," rakontas junulino; "ni ĉion povis fari, -- en la arbaron de la grafo ni iris kaj kolektadis fungojn, kvazaŭ en nian propran arbaron. La grafo nin renkontas, ekparolas, ekrigardas, kiajn fungojn ni kolektis, kaj eĉ li mem montras, kie li estis vidinta 'multajn fungojn'." "Multaj fungoj estis en tiu valetto, kie oni nun elfosis al li tombon," diris iu knabino; "nun estos terure iri tien." "Kial, malsaĝulino, estos terure?" trankviligas ŝin maljunulino; "tian bonfarulon ni ne devas timi; li, mi pensas, mortis je ni."

"Kiel li mortis je vi?" demandis iu el la amaso.

*Jasnaja Polana.

“Vidu, sinjoro, li ĉiam pri ni klopodis, kaj lasttempe li pensis eĉ sian bienon al ni oferdoni.”

Tie ĉi sin enmiksitis unu el la vilaĝanoj.

“Jes, tio estas vera. Li nin bedaŭris, tiujn, kiuj havis malmultan teron. Sed oni lin ne obeis.* Li koleriĝis kaj foriris, kiel oni aŭdis, al Jalta, oni diras, por vidi, kiel vivas tie la malriĉa popolo.”

“Jen oni vidas,” komencis ree la maljunulino, kiu interrompis la parolon de la vilaĝano, “ke je ni li ‘prezentiĝis.’” (t.e. mortis).

“Ĉu vi pensas, ke al la vilaĝanoj estos pli malbone sen li?”

“Kompreneble. En li sole, iam, estis nia tuta espero, en li — nia defendo. Okazas malfeliĉo — ĉevalo mortas, domo forbrulas, — tuj al li oni kuras: li ĉiam helpas. Ankaŭ la estraro lin obeis. Al iu vilaĝano estis ŝtelita la ĉevalo. La ĉevalon li retrovis, sed la polico ĝin ne redonas: multan monon elspezis la vilaĝano, sed sen utilo. La vilaĝano iris al la grafo; tiu ĉi nur skribis letereton kaj tuj oni redonis la ĉevalon.”

En tiu tempo alproksimiĝis la ŝarĝvagonaro, venanta de la stacio Orel. La Jasno-polananoj iel konsterniĝis, -- ĉu oni ne veturigas jam la grafon? Oni ilin trankviligis.

Estis mallume kaj malvarme. La grizan nokton tranĉis du fajroj. Mi alproksimiĝis al grupo da infanoj, je aĝo de 7 — 15 jaroj. “Ĉu ankaŭ vi funebras pro Lev Nikolajeviĉ?”

“Ni funebras; bona estis la grafo,” ekparolis unu antaŭante la alian la infanoj.

*Liaj familianoj koktraŭstaris tiun intencon.

“Ĉu li donadis al vi donacojn?” demandis ilin mia apudestanto.

“Donacojn li ne donadis al ni, sed li faradis al ni dum ĉiu nova jaro abion, kaj sur ĝi pendis ludiloj, libroj, sukeraĵetoj,” diris serioze ne laŭ sia aĝo knabo.

“Ni iradis en lian domon lerni ĉiun vesperon. ... Li nin instruis pri la vivo de Jesuo Kristo, por ke ni ne mensogu; li legadis al ni librojn pri la diversaj landoj.”

“Ĉu ĉion vi komprenadis?”

“Bele, kaj kompreneble li rakontadis kaj legadis antaŭ ni -- de li ne estas eble ne kompreni ion: li vidas ke ni ne komprenas kaj tiam li ankoraŭ unufoje legas kaj ĝin rerakontas alimaniere.”

Feliĉaj infanoj; tiu seriozeco kaj vereco en iliaj vortoj, ĉu ne estas rebrilo de la animo de ilia eminenta instruisto?

Irante nokte laŭ la vojo al Jasnaja Polana, kie ankoraŭ ne estis alveturigita la korpo, ni renkontis alian “lernanton” de Tolstoj. “Vi ŝajnas samaĝulo kun li?”

“Ne,” diris la “lernanto,” “dudek jarojn mi estas pli juna; mi lernis en lia lernejo, kiam mi estis malgranda knabo. Tio estis antaŭ longa tempo -- antaŭ nia liberigo de la servuto. ... Kaj poste mi legadis liajn verkojn. Ni ofte konversaciis. Jen nun kvazaŭ mi aŭdas lian vivan interparoladon. Li estis instruisto en la vortoj, kaj ankaŭ en la vivo,” diris la maljunulo, ekflamante. “Ĉion li mem trapasis, travivis en sia vivo, sed ne ekflugis tuj, -- ĉiujn pekojn li konis, tial li povosciis ankaŭ nin dividi de ili. Neniun li timis kaj al ĉiuj ‘predikis’ -- predikis ankaŭ al la pastroj tial, ĉar ili rabas; predikis al la estraro, ĉar ĝi ofendas la malriĉulojn. Kiu estas lin aŭskultinta, ĉiam enpensiĝas, ekkomprenas. Antaŭ

kelka tempo, ekzemple, venis niaj rekrutoj adiaŭi lin. Li komencis paroli al ili simplajn vortojn: ne fumuj, ne drinku, ne mensogu antaŭ la konscio, kaj ili ploras de tiuj vortoj. ... He, kion rakontadi! Sankta homo li estis!”

Ĉirkaŭ Jasnaja Polana ni renkontis aliajn vilaĝanojn. Ni ekparolis.

“Mi,” diris unu el ili, “interparolis kun li du tagojn antaŭ lia foriro:

“‘Nu, kiel,’ li diris, ‘vi pensas pri la revolucio?’

“Kial vi, Lev Nikolajeviĉ, demandas min pri tio? Al vi, mi diris, estas pli bone konata ĉio.”

“Sed ĉiam estas.’

“Mia opinio,” mi diris, “estas tia: simile al la babilona turkonstruado: ĉiuj portis ŝtonojn, sed ili parolis diversajn lingvojn; tial ankaŭ eliris nur malkompreniĝo.”

“Li ekridetis al miaj vortoj.”

“‘Nenio,’ li diris; ‘ĉio reformiĝos: la homoj fariĝos pli bonaj kaj pli multe amos kaj komprenados unu la alian; eble tiam vi levigos ankaŭ turon altan ĝis la ĉielo. ... Nur ni ne devas malesperi.’”

“Sed kiel agadis Lev Nikolajeviĉ renkontante malsobruojn?” demandis iu el la amaso.

“Kiu sin sentadis malsobra, tiu penis sin kaŝi; honto estis renkontiĝi kun li; sed diri la veron: tie ĉi oni eĉ ne drinkas.”



DE la 1-a de Aprilo, aperos el la eldonejo de Fritz Stephan, en Leipzig, Germanujo, Kochstr. 61, je la jara abonprezo de Sm. 1,20, monata ilustrita esperanta 20-paĝa gazeto: “Moderna Humoro;” ekz: respondkupono.

LA LASTA USONANO.

FRAGMENTO EL LA TAGLIBRO DE KAN-LI.*

(Daŭrigo)



KAJ estis tiam ke Hason faris senprudentan agon. Estante proksime de la knabino kaj tre impresata de ŝia beleco, li alparolis ŝin kiel Hur-al-missa,** kion, kompreneble, ŝi ne komprenis. Sed tio ne sufiĉis al li; li poste metis siajn brakojn ĉirkaŭ ŝian talion kun intenco kisi ŝin. Tre timigite, ŝi penis liberigi sin. Sed Hason, tenante ŝian belan mentonon per la alia mano, estis preskaŭ metinta siajn lipojn al ŝiaj, kiam la maljuna viro levis sian pezan bastonon kaj faligis ĝin kun kruela rapideco sur la kapon de nia kamarado. La frapo de la bastono sur la solidan kranion sonadis en la kupolo kaj eĥis tra la malplenaj koridoroj.

Josafa Hason palpebrumis kaj ŝanceliĝis.

Tiam, kun furio en la vizaĝo, li kuregis sur la maljunulon.

Sed tiam la juna Usonano enmiksiĝis. Li rapide alproksimiĝis, forte fermis sian ostecan manon kaj kun miriga rapideco ŝovegis ĝin antaŭen, tiel rekte ke ĝi renkontis la vizaĝon de Hason, kaj li, niasurprize, subite kaj neĝentile sidiĝis sur la marmoran pavimon, kaj la sango elkuregis el la nazo. Li estis kompatinda vidaĵo.

* Princo de Dimf-ju-Chur kaj Admiralo en la Persa Maristaro. — Prezentita de J. A. Mitchell. — Laŭ permeso tradukita de Lehman Wendell - Takomo. — Ĉiuj rajtoj rezervitaj de Frederick A. Stokes Co.

**La plej anĝela el virinoj.

Pro tio ke tiamaniera batalo estis por ni nekonata, ni estis tre konsternataj, kaj opiniis, ke li estas mortigita. Jafar-el-Beg, fortega luktisto, kun potenca korpo, furioze kuregis sur la Usonanon, por kiu mi tremis. Sed la brakon li ree elŝovegis, kaj Jafar-el-Beg ankaŭ sidiĝis. Malĝoja spektaklo ĝi estis, kaj la koro de ĉiu Perso forte ekbatis.

Ĉe tiu ĉi tempo Hason ree staris, purpura de kolero. Kun levita glavo li kuregis sur nian mastron. La maljuna viro metis sin inter ilin. Hason kun senpripensa krueleco frapegis la kapon, kaj streĉis lin sur la plankon. Momente la junulo staris konsternita, tiam ekkaptinte la bastonon de la maljunulo — peza bastono kun fera pinto — li saltegis antaŭen, kaj, pli rapide ol vortoj povas diri, donis teruran frapon sur la kapon de Hason, kiu falegis al la planko kun rompita kranio.

Ĉio tio ĉi okazis en momento, kaj freneza konfuzo sekvis. Miaj kamaradoj eltiris siajn defendilojn kaj kuregis kontraŭ la Usonanon. La knabino kuris antaŭen aŭ de teruro aŭ por protekti sian amanton, mi ne scias, kiam sago el la pafarko de maristo trapikis sian koron.

Tio donis al la Usonano la energion de dekdu homoj.

Li senkonsciigis bravan Mulai' per frapo, kiu mortigus bovon. Pri tia furio mi ne havis koncepton. Li malaltigis sian bastonon kiel fulmofajron el la Ĉielo sur la kraniojn de la Persoj, tamen li ĉiam alproksimiĝis la pordon por malhelpi siajn malamikojn ĉirkaŭi lin. Kvar el nia nombro, en tiom da minutoj, sekvis Hason al la planko. Mulai, Jafar-el-Beg, Taki-u-Din, kaj Zenjan, maristo, kuŝis streĉitaj sur la pavimo, ĉiuj mortintaj aŭ treege vunditaj.

Tiel subite okazis tio ĉi, ke por mi ĝi preskaŭ ne ŝajnis realaĵo. Mi kuregis antaŭen por haltigi la batalon, sed li malkomprenis mian celon, per potenca frapo faligis mian glavon el mia mano, kaj estis ĵus levinta la bastonon por doni al mi la duan frapon, kiam brava Omar enpaŝis por savi min, kaj subite puŝegis la glavon al la viro. Sed ho ve! la Usonano defendis sin per frapo eĉ pli rapida, kaj malaltigis sian bastonon tiel rapidege sur la kapon de mia kamarado, ke ĝi kuŝigis lin kun la aliaj.

Kiam Omar falis mi notis, ke la Usonano havas multajn vundojn, ĉar miaj kamaradoj faris multajn sovaĝajn atakojn. Li ŝanceliĝis kiam li movis sin malantaŭen al la pordo, kaj li apogis sin al la muro momente, dum la okuloj renkontis la niajn kun elrigardo de batalemo kaj malestimo, kiun mi volonte forgesus. Tiam la bastono falis el lia mano; li ŝanceliĝe iris al la granda portiko, kaj falis peze al la pavimo. Abdul kuris al li, sed li estis senviva.

Kiam li falis mirinda afero okazis — neebla afero, kiam mi pensas pri ĝi, sed kaj Abdul kaj mi vidis ĝin klare.

Aataŭ la vasta ŝtuparo kaj sidanta kontraŭ tiu ĉi pordo estis granda statuo de Georgo Vaŝington. Kiam la Usonano ŝanceliĝe falis sur la portiko, kun manoj etenditaj kaj kun la morto en la koro, tiu ĉi statuo malrapide mallevis la kapon kvazaŭ por danki pro kuraĝa batalo.

Eble ĝi estis la malĝoja akcepto de maldolĉa fino.

* * * * *

La 7an de Julio: Ree sur la maro.

Tiuĉifoje al Persujo, portante niajn vunditojn kaj la cindrojn de la mortintoj; la cindroj de la enlanduloj kuŝas sub la Granda Templo. La kranion de la lasta Usonano mi donacos al la muzeo ĉe Teheran.

(Fino)



ĈAR okazis bedaŭrinda preseraro en unu el la "Poemoj en Prozo," de Turĝenev, kiun ni publikigis en la lasta SIMBOLO, ni represas la poemon. Ĝi estas unu el la plej belaj, kaj tre pensiga:

NECESSITAS — VIS — LIBERTAS. ... BARELIEFO.

ALTKRESKA, osteca maljunulino, kun fera vizaĝo kaj senmove-malsprita rigardo, marŝas grandpaŝe kaj per sia seka, kiel bastono, mano puŝas antaŭ ŝi alian virinon.

Ĉi tiu virino de kolosa kresko, fortikega, larĝforma, kun muskoloj kiel ĉe Herkuleso, kun tre malgranda kapeto sur bova kolo -- kaj blinda -- siavice puŝas malgrandan malgrasan knabineton.

Nur tiu ĉi knabineto havas vidpovajn okulojn; ŝi kontraŭstaras, returniĝas, levas siajn delikatajn, belajn brakojn; ŝia vivplena vizaĝo esprimas malpaciencon kaj maltimon. ... Ŝi ne volas obei, ŝi ne volas iri, kien oni ŝin puŝas ... kaj, malgraŭ ĉio, ŝi devas obei kaj iri.

Necessitas — Vis — Libertas.*

Traduku -- kiu deziras.

* Neceseco -- Forto -- Libereco. (A. F.)

LUMO.

DE ARTHUR GRAY.*

“La lumo brilas en mallumo, kaj la mallumo ne komprenis ĝin.” Joh. i, 5.



LA ANTIKVULOJ komparis la agadon de la spirito kun la agado de lumo; la homan animon ili nomis lampo. “La spirito de la homo estas kandelo de la Sinjoro,” oni legas en la Proverboj. “Kiu malbenas sian patron aŭ patrinon,” troviĝas en la sama libro, “ties lampo estingiĝos en profundan mallumon.” La lumo estas la spirito. La lampo estas la animo. ...

Imagu lumon brilantan en lampo, kiu havas lumŝirmilon. Tra tiu ĉi ŝirmilo, kiel tra pentrita vitro, la spirito interna ricevas kaj elsendas lumon, kiu estas nuncita laŭ la formo kaj koloro de la transpasata vitro. La ŝirmilon oni nomas vehiklo** de la spirito. Pli komuna nomo estas animo. Ni supozu, ke ĝi konsistas el substanco diafana kiel vitro, sed fluida, plastika kaj impresebla. Ĉe homo, kiu jam faris progreson sur la vojo de la vivo, la ŝirmilo (aŭ vehiklo) jam ne estas unutona kaj malhela. “La vojo de piuloj estas kiel lumo leviĝ-

*Membro de la Teozofia Societo de Granda Britujo, kaj al li estas rezervitaj ĉiuj rajtoj.

**Vehiklo, angle “vehicle,” ordinare signifas “veturilo,” sed la aŭtoro uzas ĝin por signifi peron.--La Red.

anta, kiu ĉiam pli lumas ĝis plena tagiĝo.”* Kiel pentrita vitro, ĝi jam tralastas iom da interna lumo. Oni devas tamen supozu, ke, en la komenco, la substanco de la ŝirmilo (aŭ vehiklo) ne estis tiel malpeza, tiel diafana, kiel ĝi nun estas. En la komenco, kompreneble, ĝi estis maldelikata, maldiafana. kaj tute malebligis la trafluaĵon de la lumo, la manifestiĝon de la spirito.

Sed, kiel ni jam diris, la ŝirmilo (aŭ vehiklo) konsistas el substanco subtila, fluanta, plastika (la antikvuloj ja nomis ĝin la Elementa Akvo), kiu estas sensitiva sub la agado de la lumo, similante la antikvajn vitraĵojn de la Romanoj, videblaj en muzeoj, kiuj tiel beliĝis dum la jarcentoj pro agado de la lumo kaj de la atmosfero. Por la nuna argumento, tamen, ni supozu, ke tiu beliĝo fariĝas pro agado de la lumo sola. En la komenco, la lumo ne povas traflui la ŝirmilon, kaj la spirito do atingas nenian manifestiĝon. Sed malrapide, malkonstante, la agado de la lumo ekhavas efikon; kaj jen la substanco de la ŝirmilo (aŭ vehiklo) ekfariĝas diafana, ĝis fine la lumo ekvidiĝas tra la ŝirmilo, kaj la animo videble ekvivas. Anstataŭ la maldiafana nigro de la primitiva vehiklo, ekaperas koloroj. En la komenco, ili estas malhelaj kaj malbelaj. Sekve la koloroj ekordiĝas laŭ formoj: de la sentoj devenas la pensoj. La koloroj ne estas konstantaj, fiksitaj. Ili ŝanĝiĝas facile laŭ ĉiu fluganta eksento. Simile, la formoj, laŭ kiuj la koloroj ordiĝas, senĉese ŝanĝiĝadas laŭ la pensado. Necesas memori, ke tiuj koloroj kaj formoj konsistas el la substanco mem de la ŝirmilo (aŭ vehiklo). Ili ne estas surpentritaj. La lumo de la spirito agadas sur la ŝirmilon (sian vehiklon);

*Proverboj.

kaj, pro tiu agado, la esenca substanco de la ŝirmilo fariĝas alia: iom post iom ĝi diafaniĝas; iom post iom ĝi ordigas sian substancan laŭ koloroj kaj formoj. Ju pli longe la lumo (spirito) agadas sur ĝin, des pli bela kaj delikata fariĝas la ŝirmilo (vehiklo).

La koloroj kaj formoj de la ŝirmilo (la pasioj kaj pensoj de la animo) projektiĝas de la potenco de la interna lumo (la senmorta spirito) kiel lumbildoj vivantaj sur la eksteran mondon. Reciproke, la bildoj de la ekstera mondo atingas la spiriton interne de la lampo nur tra la ŝirmilo, kies mirinda vitro kaŝas kaj ŝanĝas ilin laŭ la senĉesa nuancado de la koloroj kaj la formoj.

Estas tre grave memori, ke animo ne kapablas krei. La sola kreo komprenebla estas la fariĝo de lumo en ĥaason. Kiel la "Spirito de Dio" en la komenco de la mondo, la animo ne kreas: ĝi nur donas formon kaj koloron. Oni parolas pri animo kaj imageco kvazaŭ tio estus fabrikejo. Sed ne estas tiel: animo plisimilas interŝanĝejon.

La funkcio de la animo ne estas kreado, sed la donado de formo, la ordigo de ĥaoso. Lumo elsendata kaj ricevata tra la ŝirmilo (aŭ animo) neniam estas pura, ĉar ĝi devas fluadi tra la nuancita vitro, pri kiu ni jam parolis. Tiu vitro estas, kiu donas kolorojn kaj formojn. Tra tiu vitro la interna lumo projektas sur la eksteran mondon bildojn, kies formo kaj koloro devenas de la nuancado de la ŝirmilo, tra kiu la spirita lumo fluas. La bildoj, kiujn projektas ĉiu individuo, estas diversegaj. Sama diverseco vidiĝas en la impresoj, kiujn ĉiu individuo ricevas de ekstere. Sed la lumo, kiu agas post la ŝirmilo de la animo, tamen estas unu kaj sama. Estas Dio.

PRI LA HEBREA "TETRAGRAMMATON."

DE JAS. F. MORTON, JR., NOV-JORKO.



MI LEGAS en "La Revuo," kun konstanta intereso kaj plezuro, en kiuj partoprenas la plejmulto de la Esperantistaro, la gravan tradukon de la Malnova Testamento, kiun tiel akurate kaj belege faras la Majstro. Estas laboro, kiu devas multe progresigi nian aferon, kaj kiu interesos ĉiun Esperantiston, ĉu li povas esti Kristano, Judo aŭ Liberpensulo. Nur pri unu punkto, mi min trovas devigata esprimi malkonsentan opinion. Mi kuraĝas eldiri ĝin, ĉar mi jam de longe, unue kiel Kristano, pli malfrue kiel Liberpensulo, zorge studis la Biblion kaj la diskutadojn de la plej eminentaj eksegezistoj kaj kritikistoj.

Oni rimarkas, ke ĉie en la traduko la titolo "La Eternulo" anstataŭas la nomon "Jehovah." Laŭ mia opinio, tio estas grava eraro, kiu iom difektas la senpartiecon de la traduko. La unua devo de tradukisto estas kiel eble plej ĝuste esprimi por la legontoj la pensojn de la originala teksto, kaj ne cedi al la preferoj aŭ la antaŭjuĝoj de la partianoj de iu ajn teorio. Se la teksto montras naivan aŭ superstiĉan kredon, ne estas prave, ke la tradukisto ĝin kaŝu sub grandioza frazaranĝo, por fari plezuron al tiuj kiuj nepre volas kredi, ke la libro estas tute dieca kaj senerara. Estas la devo de la bona tradukisto, diri nur la simplan veron, kaj lasi al la teoriistoj la diskutadon pri la perfekteco de la libro. Se originala teksto enhavas erarojn, aŭ montras maljustan aŭ malindan ideon pri Dio, ne estas honesta ago trompi la popolon per malkorekta aŭ duba traduko. Diru la

veron! Se oni povas klarigi ĝin konforme al la komuna kredo, bonege! se ne, tamen diru la veron! La vero estas pli grava, pli dezirinda por la bonfarto de la homaro, ol ĉiuj Bibliojoj kaj ĉiuj religioj aŭ filozofioj.

Mi zorge legis la "Antaŭparolon," en kiu la Majstro donas tre klare siajn rezonojn por la uzado de la vortoj "La Eternulo;" sed mi restas tute nekonvinkita. Mi ne dubas pri lia sincereco; ĉar tie ĉi, kiel ĉie kaj ĉiam, li ĝin tre klare montras. Sed ni pli zorge ekzameni la aferon, kiel senpartiaj juĝistoj, kiuj ne celas venkon nek por la Kristanismo, nek por la Liberpenco, sed nur por la vero.

Komencante per "Genezo," kaj tralegante la Malnovan Testamenton, ni ne povas eviti la memevidentan konkludon, ke la verkistoj de la diversaj broŝuroj de la libro ĉiam uzis la vorton "Jehovah" kiel nomon de la hebrea Dio. Li estis laŭ ilia vidpunkto aparta persono kun aparta nomo, kiu apartenis al li ĝuste kiel al la Dioj de la aliaj popoloj apartenis iliaj propraj nomoj. Chemosh, Dagon, Jehovah, Baal kaj la aliaj estis la Dioj kiuj favoris la diversajn gentojn; kaj la Hebreoj, simile al la aliaj gentoj, ĉiam fanfaronis, ke ilia Dio estas pli potenca ol la aliaj, kiuj ofte cedas al li. Nur dum la lastaj libroj de la Malnova Testamento ni trovas tekstojn, kiuj pli-malpli klare asertas, ke tute ne ekzistas alia Dio ol Jehovah; kaj eĉ en tiuj ĉi libroj "Jehovah" estas persona nomo, kaj ne titolo. Se oni tradukus la tutan grekan literaturon, kaj ĉie uzus kelkan belan titolon anstataŭ la nomo "Zeus," kion dirus la kleraj legantoj? Se oni ĉiam tradukus "Jupiter" per "Dia Patro," uzante la esprimon ne kiel nomon sed kiel titolon, kiu ne riproĉus la tradukiston pro la trompiganta traduko?

Pri la vorto "Jehovah" mem, oni tute ne scias la ĝustan silabadon, nek la ĝustan signifon; tial, eĉ se estus permeseble traduki ĝin per titolo, la esprimo "La Eternulo" estas nur konjekto. La plej kleraj hebreaj instruistuloj jam de longe diskutadas pri tio, kaj tute ne kunkonsentas. Por oportuneco, mi ĝis nun en tiu ĉi skribaĵo uzis la plej konatan silabadon, kvankam mi multe preferas "Yahweh." Tiu ĉi povas esti proksimume ĝusta, kvankam ne estas certe; sed "Jehovah" certe estas maljusta; ĉar, kiel oni scias, la antikva hebrea lingvo ne uzis la vokalajn signojn; kaj kiam oni eltrovis tiujn ĉi, la stranga superstiĉo, kaŭzita de la malkompreniĝo de la tria ordono en la dekalogo, ke estas grava peko elparoli la dian nomon, jam de longe ekzistis; kaj oni alkitimiĝis, kiel memorigas la Majstro, diri ĉiam "Adonai" (la Sinjoro) anstataŭ "Yahweh." Tial oni forgesis la ĝustan elparoladon de la dia nomo, kiun oni ofte nomis "Tetragrammaton" (greke, "kvarlitera vorto"), kaŭze de la kvar konsonantaj literoj kiuj faris la vorton. (Estus tre interese riparoli la kredojn kiuj sekvis tiun ĉi kutimon, pri la magia potenco, kiu apartenus al tiu, kiu sciis elparoli la "Tetragrammaton;" sed tio ĉi estas alia temo.) Kiam do oni skribis la sanktajn librojn kun la vokalpunktoj, oni donis al "Yahweh" la vokalojn de "Adonai;" kaj kiam oni laŭte legis, oni diris "Adonai," kiam la teksto diris "Yahweh." Sed ĉu "Yahweh" efektive signifis en la komenco "Estanton," "Eternulon," "Kreanton," "Kaŭzanton," "Potenculon" aŭ ion alian, estas tute negrave; ĉar oni ĝin uzis sole kiel propran nomon de persono, kiu estis la genta Dio. Kiam oni legas la librojn de la religiaj sistemoj, kiujn ĉiu nun nomas mitologioj, oni ne demandas pri la originala signifo

de "Zeus," "Jupiter," "Odin," aŭ iu alia Dio. Oni povas kredi aŭ malkredi ke la plejpotenca Dio de la tuta mondo sin nomas (aŭ dum kelka tempo sin nomis) Yahweh; kaj ke dum kelkaj centjaroj li funkciis kiel la patrona Dio de unu sola gento el la popoloj de la mondo; sed almenaŭ estas prave komprenigi malkaŝeme la fakton, ke tion kredis la antikvaj Hebreoj; kaj tion ili klarege skribis en siaj sanktaj libroj. Kio ajn povas esti bona kaj vera en la juda, la kristana aŭ iu alia religia sistemo ne estos perdita nek difektita per tiu sciado; kaj kio estas falsa devus pereji kiel eble plej baldaŭ.



KRISTANAJ PENADISTOJ, Atentu! La tutmonda kunveno de la "Unuiĝinta Societo de Kristana Penado" okazos en la mondfama somerkunvenejo, Atlantic City, ŝtato New Jersey, de la sesa ĝis la dekdua de Julio, 1911. Laŭ aranĝo de la Sekretario, S-ro William Shaw, el Boston, de la naŭa ĝis dekkvin minutoj post la deka matene, mardon la 11an de Julio, estos donate al la Esperantistoj. Pastro R. P. Anderson, unu el la tradukintoj de "La Evangelio laŭ Sankta Johano," kaj tre fervora Esperantisto, prezidos. Ni aranĝos planojn por la propagando de Kristana Penado per Esperanto, kaj eble organizos asocion. Venu, Kristanaj Penadistoj, kaj alportu kun vi bonajn propagandajn ideojn. Se oni volas ekscii plu pri la afero, sin turnu al Pastro L. E. Catlin, en Blossburg, ŝtato Pensilvanio, kiu helpas al Pastro Anderson pri la aranĝoj.



SENDU LA SIMBOLO'N al viaj geamikoj.

KIEL BELA ESTAS LA VIVO!

EL PSIKOLOGIO DE L' RUSA JUNULARO.*

(Daŭrigo)

III

BALDAŬ mi havis okazon transekloĝi el Napolo Romon.

La "Eterna Urbo" ensorĉis min per riĉeco de siaj historiaj monumentoj. Rigardado de antikvaj ruinoj, dissemitaj tra la tuta urbo, de muzeoj, pentraĵogalerioj, preĝejoj, vizitado al ĉiuj ĉirkaŭaĵoj, komencanta je la ruinoj de l' pentrinda "villa di Adriano" kaj finanta per la fama pro siaj kaskadoj Tivoli; fine — amaso da novaj konatiĝoj: ĉio ĉi nevole forstrekis el la spirito memorojn pri la pasinto kaj igis vivi streĉe nur por la estanto. En elspiraĵo de ĉiuj ĉi novaj impresoj, la nedaŭra konatiĝo kun Rozo estis tute forgesita.

Okaza renkonto rememorigis ĝin al mi.

Tio estis preskaŭ unu jaro post kiam mi forlasis Napolon. Fojon vespere mi vizitis nian konatan verkiston, ĉe kiu laŭkutime kolektiĝis malgranda rondo da amika junularo. La interparolo estis kunmetata el iaj abstraktaj temoj, eble pri "la beleco en la arto." Kiel ĉiam, ĝi estis sufiĉe pasia kaj verva.

Dum furiozapogeo de disputoj, jen en la koridoro timeme eksonoris la sonorilo.

"Kiu ĝi povas esti?" miris la dommastro, rigardinte la horloĝon. "Jam komencas la dekdua; el konatoj dube ke iu vizitus nin en tia malfrua tempo."

* Laŭ efektivo verkis Simeon Poltavski el Saratov, Rusujo.

La servistino iris malfermi la pordon, kaj post unu minuto sur la sojlon, tenante en la manoj malgrandan frotdifektitan valizeton, aperis Rozo.

“Jen estas mi. Ĉu oni povas?” diris ŝi kun tiu libera ŝercemo, kiu ĉiam estas propra al la personoj, ĵus alvenintaj post vojaĝo en bone konatan ejon.

Mi nekomprenmiene rigardis la mastron.

“Ho, ni nin konas jam de longa tempo!” respondis li al la mia rigardo. “En Napolo ni nin renkontadis tre ofte. Do, vojaĝantino, kia bona vento venigas vin tien?”

“Ĵus el Napolo,” rediris Rozo, frotetante la iom bluiĝintajn de l’ vespera malvarmeto manojn. “Mi min direktas Parizon.”

“Parizon?!”

La vizaĝo de la verkisto subite nebuliĝis.

“Ĉu vi havas la monon?”

“Certe,” timeme respondis Rozo.

Ŝia ŝercemo malaperis kaj ŝi refariĝis same tromosta, konfuziĝema kaj senforta, kia mi ŝin vidis en Napolo.

“Certe. ... Mi aĉetis la bileton ĝis Parizo mem.”

“Sed krom la bileto -- ĉu vi havas ion por la vojaĝo?”

“Jes ja,” rapidis Rozo. “Mi havas, mi havas -- tre multe.”

“Kiom?” ne volis trankviligi sin la dommastro.

Rozo konfuziĝe eltiris malgrandan senkoloran monujon kaj komencis kalkuli la enhavatajn tie kuprajn kaj nikelajn monerojn.

“Dudek -- kvardek -- naŭdek -- preskaŭ unu franko kaj duono,” ŝi proklamis fine.

“Unu franko kaj duono?! por la kvartaga vojaĝado? Sed vi mortos de malsato, frenezulino!” ekscitiĝis la

verkisto. "Jen al vi dek frankojn. Kio? Ho, ĝi estas bagatelo! Nu, se vi ne volas dek frankojn, jen al vi kvin. Poste vi ilin redonos al mi. Unu franko kaj duono!--sed tio estas vera frenezaĵo! Komprenu vi, ke, krom la demando pri nutraĵo, vi ja bezonos ie halti post alveno Parizon."

"Sed mi havas adreson de unu Rusa fraŭlino," re-diris Rozo, ridetante per sia infana favoremiga maniero.

"Nu, vi bezonos fiakron, gvidiston, eble alion. ... Kaj -- pardonu, ĉu vi konas bone la lingvon francan?"

"Oni diras, ke ĝin ellerni estas tre facile," konfuz-iĝis Rozo.

"Pro kio do vi veturas Parizon?"

"Pro laborenspezoj."

Rozo ree ekridetis.

"Al mi rakontis konatino, ke tie oni povas tre facile akiri la ĉapelarton kaj gajni bonajn monsumojn. Mi do jam de longe pensas fariĝi sendependa. Rebeka -- ŝi estas tre bona, tamen por mi estis tre malagrabla vivi ĉe ŝi. Al mi ĉiam ŝajnis, ke mi ŝin ŝargas. Vere, mi neniam restadis sen laboro. La tuta hejma mastraĵo kuŝis sur miaj ŝultroj. Rebeka zorgis nur pri siaj lecionoj. Sed mia situacio min ĉiam malkontentigis. Jen -- nun mi trovis iom da mono kaj mi volas elprovi la feliĉon."

Kaj poste, ŝanĝinte la tonon, ŝi demandis:

"Pardonu, ĉu mi povas eliri por unu minuto en alian ĉambron? Mi volas iom ordigi min. Dumvoje mi malordigis."

Ne atendante respondon, ŝi foriris el la ĉambro.

"Kia kortuŝanta tipo!" La verkisto malgaje ek-svingis la manojn. "La fraŭlino preskaŭ mortas de

malsata kaj ftizo -- kaj ŝi ankoraŭ ion esperas. Revas la ĉapelarton. ... Ĉu vi rimarkis, kiel nenormala estas brilo de ŝiaj okuloj? Estos bone, se ŝi vivos ankoraŭ unu jaron. Sed eble ŝi degelos pli frue.

IV

Kiam Rozo, sin lavinte kaj iomete freŝiĝinte, reiris al ni en la gastoĉambro, la interparolado estis jam turniĝinta al la antaŭa temo: la beleco en la arto.

“Kion vi diras?” Ekscitite svingis la manon juna blonda studento, nur antaŭ kelkaj monatoj trafinta Romon el la larĝaj bordoj de la multakva Dnjeper. “Ĉu la impresbla plato de la fotografilo povas iam ajn ricevi sur sin impresojn de la vera beleco? La vera beleco nepre estas viva. Kaj por montri tiun vivecon, oni bezonas ion alian, pli grandan, ol simplan senaniman platon: oni bezonas vivantan homintelekton...”

“Atendu iom,” bonhumore kontraŭdiris la dommastro. “Ĉu via okulo povas ricevi tiun ĉi impreson de la ‘vera’ beleco?”

“Ni supozu...”

“Kaj ĉu via okulo ne estas fotografila plato?”

“Jes, sendube ... sed vi forgesas...”

La disputo disflamiĝadis pli kaj pli. Rozo laŭkutime silentema, ĝibiĝinta kaj virmaniere metinta la manojn post la dorson, malrapide paŝadis en la ĉambro, aŭkultante atente la disputantojn.

Fine, longedaŭraj kaj, kiel ordinare, senfruktaj disputoj komencis videble lacigi la ĉeestantojn. Por transigi la parolojn al aliaj temoj, la dommastro sin turnis al Rozo kaj ŝerce demandis:

“Nu, kion vi pensas pri ĉi niaj parolverŝadoj?”

Ŝi ĉesis paŝadi kaj pense kuntiris la brovojn.

“Verdiri ...”

Sammomente eniris ŝian kapon, ŝajne, ia nova granda penso, kaj ŝi, ekridetinte, konkludis neatendite:

“Kiel bela estas la vivo!”

“Do?!”

“Jen vi vidas, kiel riĉa je diskutaferoj estas la vivo -- ĉiuj ili tiel interesaj! Kaj ĉiujn ilin oni devas solvi. Dank' al tiuj aferoj la vivo mem fariĝas interesa. Fariĝas sentata en ĝi ... nu, kiamaniere esprimi ĝin? ... ia beleco. Ĉu vi min komprenas? Oni vivas, kvazaŭ oni solvas ian interesan aritmetikan problemon. Kaj finon tiu problemo tute ne havas. Ju pli longe oni ĝin prilaboras, des pli ĝi antaŭenlogas: ĉiam novaj kaj novaj demandoj ekaperadas.” ...

“Ŝajnas al mi, ke je malsata stomako tiu ĉi matematiko ne bone taŭgas,” ridparolis la mastro.

“Kian rolon havas ĉi tie la stomako?” viviĝis Rozo?

“Mi ne komprenas. Jen antaŭ kelkaj tagoj iu kruela homo en Napolo diris al mi la samon. ‘Kial vi,’ li diris, ‘ĉiam tiel entuziasme parolas pri la vivo? Vi mortos de malsato en kelkaj monatoj, aŭ la ftizo vin sufokos. Do por vi tute ne taŭgas kolorigi la vivon per tro helaj koloroj.’ ... Kaj mi respondis al li: ‘Kaj vi, karulo, mortos de maljuneco. Ĉu ne sama afero? Sed la vivo, kiel ajn estanta, restas ĉiam bela.’”

Ŝi malforte altigis la ŝultrojn kaj ĉirkaŭis la ĉeestantojn per demandema rigardo.

“Ĉu mi ne parolis vere? Laŭ mi la esenco de la aferoj tute ne konsistas en la demando: ĉu mi mortos de malsato aŭ de alia kaŭzo. La vera vivo, laŭ mi, disvol-

viĝadas en la kapo, ne en la stomako. Malsato, diversaj malsanoj -- ĉio ĉi estas kontraŭvola. Sed la pensoj estas liberaj, tute liberaj, kiel birdoj, por flugi kien ili volas. Kaj la loko traflugebla de ili en la vivo estas tiom vasta, ke oni neniam venkos ĝian senfinecon. Jen en kio konsistas la ĉefa intereso."

Neniu kontraŭparolis. Ĉiuj sin sentis jam lacaj kaj neniu volis daŭrigi la disputadon.

Rozo kuncentriĝe ekpaŝis trans la ĉambron kaj ree haltis.

"Jen vi diras: la stomako! Sed ĝi ja same laborigas la penson, ... eble eĉ pli forte laborigas, ol io alia. Ĉu ne vere? Prenu ekzemple Socialismon. Kiom da vigleco tiu teorio enhavas en si! Kiom da fieraj kredantoj ĝi dissemis sur la tero! ... Jen ĝi elkreskis sole nur el la malsata stomako. Kiel bonege taŭgis! Kaj kia bela matematiko!"

Rozo iom pripensis kaj volis daŭrigi. Sed ŝia rigardo rimarkis lacan enuan esprimon sur vizaĝoj de la ĉeestantoj, kaj ŝi, konfuziĝinte, silentis.

* * * * *

La morgaŭon ŝi forveturis Parizon.


(Daŭrigota)



SINJORO Sulzer, de la Usona Kongreso, lasttempe faris proponon deklari la internacian traktaton de 1833 inter Rusujo kaj Usono forigita, okaze de la fakto, ke la registaro de tiu lando rifuzas akcepti la pasportojn de Usonaj Hebreoj. Ĉiu organizaĵo de la hebroj en Usono subtenis la proponon kun peto; kopiojn de kiu lasta oni jam dissendis tra tuta nia lando.

PRI PILSEN.

INTERESA LETERO DE D-RO VOLKMANN.*



ROM la ĉefurbo Praha (Prague) kaj la banurboj Karlsbad, Marienbad kaj Francesbad, estas certe la bierurbo Pilsen (boheme, Plzen; "n" kiel franca "gn") la plej konata urbo de Bohemujo. Ĝi estas, kiel la cititaj banurboj, en okcidenta Bohemujo. Ĝi havas 80,000 loĝantojn (kun antaŭlokoj, pli ol 100,000), inter tio 10,000 germanojn kaj judojn, -- la ceteraj estas bohemoj. Multe da fumo pendas senĉese super la "nigra" urbo, ĉar en ĝi estas pli ol 80 grandaj industriaj entreprenoj, el kiuj la tri bierfarejoj, precipe la Burĝa, kaj la fabrikego de Ŝkoda estas mondkonataj.

Pilsen estas la dua plej granda urbo en nia antikva regno Bohemujo. En la urbo kunfluas la rivero Mze (mĵe) kun la rivero Radbuza, akceptinte antaŭ ĝi la riverojn Uhlava kaj Uslava. En la ĉirkaŭaĵo de la urbo oni ankoraŭ nun iom portas specialajn pentrindajn naciajn kostumojn (ĉe viroj longaj surtutoj kun multaj butonoj; ĉe virinoj, tre larĝa jupo), kaj okcidente jam komencas la "germana teritorio" de nia patrujo.

Pilsen aŭ Plzen konsistas el "Interna urbo," ĉirkaŭita triparte de antaŭurboj, norde de Saksa, okcidente de Imperia, kaj oriente de Praha'a. La interna urbo, eĉ la apuda norda parto de Imperia antaŭurbo, kie estas stacidometo (la ĉefa stacidomo kun granda kupolo estis

*Tiuj ĉi leteroj estas skribitaj al Seatla Samideanino, kiu, laŭ permeso de la klera Doktoro, transsendas ilin al ni por enpresigo en LA SIMBOLO.

en Praha'a antaŭurbo) havas belajn modernajn domojn, plejmulte du-, eĉ trietaĝajn; sed en aliaj partoj de l' urbo estas en multaj stratoj nur neriĉaj kaj negrandaj dometoj, loĝataj de malriĉularo, precipe laboristaro; ie eĉ sendomaj lokoj. La laboristaro apartenas al partioj socialdemokrata kaj nacie socialista. Post kvin minutoj da iro oni jam povas ie veni el centro de urbo en kampojn, kaj post kelke da plujaj minutoj en arbarojn.

La Burĝa bierfarejo estas proksime de la ĉefa stacidomo, en norda parto de Praha'a antaŭurbo. Ĝi estis fondita en 1842 de tiamaj posedantoj de Pilsenaj domoj. Tiam konsistis la urbo preskaŭ nur el ĉefplacego kun apudaj stratetoj de nuna Interna urbo, kie ĝis nun staras la "bierrajtigataj domoj," inter kies nunajn posedantojn oni dividas la grandegan profiton de la bierfarejo. La domoj estas ĉirkaŭ 250, la profito por ĉiu domo atingas jam preskaŭ la ciferon 15,000 koronojn ĉiujare (unu korono egalas unu frankon kaj havas cent helerojn). La "bierrajto" estas nedisigeble kunigita kun la domo aŭ pli ĝuste kun la tero, kie la domo staras. Eĉ unu mal-konstruita dometo, el kiu nur mureto kun pordo ("bierrajtigita pordo") restas, ricevas sian jarprofiton. La bierfarejo produktas jare 900,000 hl., glaso da biero (duonlitro) kostas en Pilsen 17 helerojn. Kompreneble, multaj domoj havas multajn posedantojn, inter kiuj la profito dividiĝas. La nomo de biero el tiu ĉi bierfarejo estas Prafonto (Prazdroj, Urquell); je sia bonegeco ĝi dankas al bonega akvo kaj bonegaj aparatoj kaj materialoj. La du ceteraj bierfarejoj atingas ambaŭ entute nur eble duonon da grandeco de la Burĝa, kiu estas simila al tuta urbeto. La Akcia faras "akcian" bieron; la Societa "originalan pilsen'an bieron" aŭ "Kaiser-

quell'' (imperiestra fonto). Ili ambaŭ estas preskaŭ tute en germanaj manoj; la Burĝa estas duone bohema. Ili staras proksime de la Burĝa, pli nordoriente. Simile grandega entrepreno estas en Imperiestra antaŭurbo, apud la jam citita stacidometo, sekve en okcidenta parto de l' urbo, la fabrikego de Ŝkoda. Ĝi havas 4,000 laboristojn kiuj faras pontojn, kanonojn, ĉiuspecajn feraĵojn, ktp. La eksposedanto estis Ŝkoda, nun ĝi estas akcia entrepreno.

Ĉio cetera en Pilsen havas jam ne internacian, sed pli nacian aŭ nur lokan signifon. Interesa estas la bela kaj regula ĉefplacego en Interna urbo. Tie staras renesanca urbodomo, la ĉefdekanejo, kaj ne tute en la mezo de la placego la tre granda preĝejo de Sankta Bartolomeo kun alta turo. Sur la ĉefplacego estas la kvaronjaraj fojroj, nun ne jam tiel vizitataj, kiel antaŭe. Tie ankaŭ estis ekspoziciita en 1695 la kondukinto de Ĥodoj, Kozina-Sladky, sur malhonora kolono. Ĥodoj volis tiam elbatali por si la liberecon, garantitan al ili per reĝaj privilegioj, sed la nobelaro ekdevisis ilin servuti (senpage labori sur nobelaj kampoj), ordoninte ilian kondukinton sur malhonoran kolonon dum tri tagoj ekspoziciiĝi kaj post tio esti pendigata.

El rimarkindaĵoj de la proksimaj, ankaŭ belaj stratoj, mi citas nur la alian, grandan preĝejon pilsen'an, apartenantan kun apuda monaĥejo al Franciskanoj, kun artaj pentraĵoj en la koridoroj; la preĝejon de Sankta Ano; la "justecpalacon" (juĝejon); kaj la biervendejon (restoracion) de Salzmänn per bonega Prafonto faman.

La ĉefpalacon kun stratetoj ĉirkaŭas kiel ringo la bela Parkstrato, havanta kelkajn nomojn (Smetanaparko, Ŝafarikparko, Stefanparko, ktp.) kaj anstataŭanta

la antaŭajn fortikajn muregojn, kiuj iam ĉirkaŭis Pilsen'on, restintan eĉ en grandaj religiaj malpacoj (antaŭ 500 jaroj) fidele katolika, nevenkeblan eĉ por la fama kondukinto de husanoj Zizka.

En parkstrato mi citas sude la modernan urban teatron, norde la muzeon kun granda germana hotelo "Pilsner Hof" (proksime estas ankaŭ la centrejo de Germanoj "Deŭtsches Haŭs" kun germana teatro), oriente la duone germanan modernan hotelon Waldek kaj la belan kaj modernan "beseda" (centrejo de bohema burĝa societo, kiu tie havas koncertojn, balojn, ktp.). Antaŭ tiuj lastaj du konstruaĵoj staras en mezo de la parko monumentoj de patrioto Smetana (fizikisto, premonstrata pastro) kaj de merita urbestro Kopecky, plue la Urban ŝparkason; kaj okcidente la sinagogon (Pilsen kiel komerca kaj industria urbo havas sufiĉe da judoj) kaj kontraŭ ĝi la belan novan domon de Komerca Ĉambro (grava komercoficejo).

Se oni iras el ĉefplaco al la ĉefstacidomo, oni vidas en mezo de la vojo maldekstre la grandan parkon Obcizna (oficiala nomo estas "Parko de Pechaĉek," laŭ merita urbestro), bedaŭrinde plenan da fumo, ĉar nur rivereto Radbuza dividas ĝin de Burĝa bierfarejo. Tie meritas rimarkon la konstruaĵoj Strelnice (Pafejo), apartenanta al "akrapafistoj," malnova burĝa gardistaro, konsistanta el homoj, kiuj dimanĉe, eĉ alfoje, portas militsimilajn kostumojn kaj aranĝas por sia amuzo marŝojn, festojn, ktp.; kaj Sokolovna (Sokolejo), apartenanta al bravaj Sokoloj, kiuj estas grava nacia institucio, fondita de patriotoj Tyrš kaj Fuigner, havanta demokratiajn kutimojn (oni sin alparolas per "frato," kvankam la anoj apartenas al ĉiuj popolklasoj) kaj konata ankaŭ longe ekster

de limoj de nia patrujo. Sokoloj portas specialan vestaron de hela kafa koloro, ruĝan ĉemizon, kaj sur kapo platan ĉapelon kun falka plumo ("sokol" signifas "falco"). Ilia celo estas plifortikigi per gimnastiko korpon. Ekzistas eĉ sokolinoj kaj rajdaj sokoloj. En norda parto de Obcizna kunfluas Mze kun Radbuza.

Pilsen havas tri tombejojn. Sur unu, tiu en Praha'a antaŭurbo, ripozas la patrioto J. K. Tyl, bonega aktoro kaj "bohema Shakespeare," kiu baldaŭ havos antaŭ la teatro monumenton, kiel havas proksime de tie lia amiko Smetana.

El ceteraj rimarkindaĵoj estu citataj nur la de pilsen'aj tre vizitata parko Lochotin (kvaronhoron norde de la urbo; oni tien iras trans la plej longa pilsen'a ponto, kies nomo estas "saksa"), kaj la arbaro apud Bory en kontraŭa (suda) direkto, de kie oni vidas malproksime eĉ la landliman belan montaron Ŝumava.

La urbo Pilsen havas kelkajn mezajn kaj fakajn lernejojn, bohemiajn kaj germanajn (gimnazioj, realaj lernejoj, industriaj lernejoj), multajn lernejojn unuagradajn, naĝejojn, malsanulejojn, soldatejojn, ktp. ktp. Tra la urbo veturas en kelkaj direktoj tramvojo. Mi povus ankoraŭ multe skribi, sed mi jam finas la artikolon, kiu volas esti nur malgranda skizo de mondkonata bierurbo.



LA DUA Kongreso Internacia ke Katolikaj Esperantistoj okazos en Hago de la 14a ĝis la 19a de Aŭgusto 1911. La Kongreskomitato petas la gazetojn fari tiun anoncon. Ilia devizo estas: "Ĉiam antaŭen!" En tiu kongreso, kiu estos tute internacia, oni pritraktos interesojn katolikajn. La adreso estas: Da Costastraat 24.

EKLEZIO DE L' MORGAUO.

DAURIGA EKSPOZICIO DE NIAJ IDEOJ.

NI KREDAS, ke la homo portas el la senfina estinto memoraĵojn, kaj devas sekvi, ke, funde, ĉiu homo posedas ĉiujn eblajn homajn kapablojn, — por montri iun ajn nur necesas, ke la cerbo plene kresku kaj ke la bezonataj cirkonstancoj okazu. Alivorte, se la homo estas norma, li montrus tiujn kapablojn kiujn la stato de lia tempo postulas. Do la vera bazo de la instruarto estas la sugestio, kiu simple vekas la dormantan memorpovon. De kio sekvas, ke la devo de la homoj estas fari tiujn kondiĉojn, kiuj pleje promesas la plenan disvolviĝon de la homa cerbo kaj la homaj fortoj.

Kompreneble, tiu ideo ampleksas la staton de la tuta familio. Ĝi postulas, ke la gepatroj estu sanaj kaj prudentaj; ke ekzistu inter ili reciproke forta amo; ke ili sekvu la konatajn leĝojn pri la seksa interrilato; ke la patrino konu bone la efikon sur la embrio de siaj pensoj kaj emocioj; kaj ke la unuaj, la plej impreseblaj jaroj de la infano estu plenaj de zorge elektitaj sugestioj kaj saĝaj ekzemploj.

Multaj, terurige multaj gepatroj ĝisnunaj tute ne povas plenumi tiujn postulojn; pro kio, estas konsilinde, ke la ŝtato aŭ la komunumo zorgu pri la infanoj de ilia naskiĝo kaj ilin eduku. Ordinare, la gepatroj aŭ tro amas la infanojn, kaj tiel allasas, ke ili kresku kiel dependuloj; aŭ ili malzorgas ilin kun rezulto, ke ili fariĝas kvazaŭ sovaĝuloj. Al tio, se la ŝtato aŭ la komunumo unue edukus zorgontojn, kredeble la problemo fariĝus pli simpla.

Ĉar la edukado de infanoj postulas tiel multe da forto, pacienco, sagaceco kaj zorgo, se la ŝtato aŭ la komunumo tiun farus, tio permesus, ke la gepatroj, speciale la patrino, havu pli multe da tempo por si mem, por sia propra disvolviĝo. Do la Eklezio de l' Morgaŭo proponas konstrui apartan domon por la infanoj kaj elekti el siaj membroj kelkaj, kies devo estos zorgi pri kaj eduki la infanojn en propra hejmo kaj laŭ sciencaj metodoj. Tio ne signifas, kiel eble pensos iu, ke la gepatroj fordonos al la ŝtato aŭ la komunumo siajn infanojn; ne, ĝi nur signifas, ke, la komunumo ekzemple, prenos sur sin la ĉiutagajn devojn, por plenumi kiujn postulas nun de la gepatroj tiel multe da iliaj tempo kaj forto. ...

Alia afero: multe da tempo de la familio nun estas pasigata en la kuirejo, por prepari kaj kuiri la manĝaĵojn kaj pretigi ĉi tiujn por la tablo. La mastrino aŭ la servantoj devas tiel pasigi grandan parton de la vivo. Por eviti tion, la Eklezio de l' Morgaŭo proponas konstrui komunan manĝoĉambron kaj kuirejon. Sed, pro tio, ke ĉiu havas propran guston rilate manĝaĵojn, manĝohorojn kaj aranĝon de la manĝejo, ni proponas havi en la komuna konstruaĵo apartajn ĉambretojn, kiujn povas lui tiuj, kiuj tiel volas private manĝi. Kaj por allasi liberon en la elekto kaj preparo de la manĝoj, ni provizos karton kun listo de tiame haveblaj manĝaĵoj, per kiu karto oni povos informi la kuiriston pri siaj preferoj. ...

Se la homo ne plu devas zorgi pri infanoj kaj pri la preparo de manĝoj, li ne bezonos tiel grandan domon kiel nun. Nur du-tri ĉambroj sufiĉos. Tiujn li povus pli bone konstrui kaj pli bele ornamu, ol nun. Posedi grandan kaj multekostan domon estus neprudente, maloportune, kaj maltrafus la celon, kiu estas ŝpari tempon

kaj laboron; ĉar, memevidente, ne estos servantoj en nia komunumo: ĉiu devos zorgi, li mem, la proprajn hejmajn aferojn. Fakte, la hejmo estos loko sanktigita al la posedantoj. Tien ili iros por esti solaj, kaj neniu alia tie sin trudos sen speciala invito. Kontraŭe, la komuna konstruaĵo, kiu krom manĝoĉambroj kaj kuirejo, ankaŭ enhavos bibliotekon, ludĉambrojn, gimnazion, skribĉambron, salonon por balo kaj malgrandan teatron, estos la loko, kien oni iros renkonti konatojn kaj pasigi tempon kun amikoj. ...

Por plej efike efektiviĝi ĉi tiun planon de komunejo, la privataj domoj devos esti grupigitaj kiel eble plej proksimaj de la komuna konstruaĵo. Tial, oni dividos la teron tiamaniere, ke la hejmfarantoj havos tie nur malgrandan parcelon, nur sufiĉe vastan por dometo kaj florigardeno. Kompreneble, pro tio, ke la bieno apartenos al tuta komunumo, oni luos sian parcelon kaj vere posedos nur la rajton ĝin uzi kaj siajn laborrezultatojn. Se oni volus forlasi la komunumon, tiu ĉi aĉetos liajn nmoveblajn havaĵojn, laŭ jena metodo: la forlasonto elektos taksonton, la komunumo elektos alian, kaj ĉi tiuj du elektos trian. La decido de du el la taksintoj faros la vendprezon.

Pli malproksime estos la fruktĝardenoj, kampoj, kortbirdejoj, paŝtejoj, kaj ejoj por la diversaj formoj de komunuma laboro. Ankaŭ tie oni nur per luo ricevos rajton uzi la teron kaj la konstruaĵojn. La komunumo konstruos kaj posedos ĉiujn konstruaĵojn escepte nur la privatajn domojn. Tamen, por ke ĉiu persono havu la oportunecon kreski nature kaj disvolviĝi libere, ĉiu entrepreno devas esti aŭ sub direkto de tiu, kiu volas ĝin starigi, aŭ sub direkto de libera kunlabora asocio. Pri

la komuna manĝejo kaj kuirejo kaj la vendejo: ĉar la ĉeesto kaj bezonoj de la anaro estos ĉefa fonto de la profito, tiuj entreprenoj donos rabaton al la komunumanoj periode laŭ ĉies elspezoj kun ili dum tiu tempo.

Plue, ĉar estas per la Eklezio kaj la idealoj pro kiuj ĝi staros kaj kiujn ĝi konservas, ke la komunumo ekzistas, estos la devo de ĉiu pagi en la eklezian kason po deklono da ties monataj enspezoj. Returne, la Eklezio siaparte zorgos pri la infanoj kaj edukos ilin; flegos malsanulojn, zorgos pri maljunuloj, enterigos la mortintojn, kaj plenumos aliajn devojn kaj servojn, kiujn eklezioj kutime faras. La komunajn enpezojn pro luado oni elspezos por konstruaĵoj, stratoj, la pagado de komunumaj ŝuldoj kaj impostoj, ktp.



USONA Asocio Esperanta lasttempe elektis jenajn komitatojn: Por Propagando, D-ro M. M. Henry, Dayton, Ohio; Juĝisto J. D. Flenner, Boise, Idaho; S-roj Bert P. Mill, Idaho Springs, Idaho, kaj Reginald Kerkhoven, Spokane, Wash. Por ellabori ekzamenan demandaron, D-ro Warren Sherwood, Lancaster, Pa.; S-inoj Martha B. Cary, Middletown, Conn., Ida Selma Kurtz kaj Sarah Josephine Moore, Washington, D. C. Por ellabori planon pri eldonota oficiala informilo (Revuo), D-ro Abraham Rudy, Raleigh, N. C. J. Wilford Davis fariĝas Sekretario por la Distrikto de Columbia. La estraro petas al tiuj, kiuj ne ankoraŭ pagis la jarkotizaĵon, unu spesmilon, ke ili tion faru, ĉar mankas al ĝi mono por propaganda laboro. Sendube tiuj lertaj Esperantistoj baldaŭ faros tre kontentigajn raportojn kaj tiel bone prosperigos la novan asocion.

RECENZOJ. — DE W. R. D.

UNUAJ AGORDOJ: Poezioj de Wiktor Elski kaj Eska. Presitaj de Stanislaw Miszewski, Lodz, Polujo. Prezo, 20 sd.; 94 paĝojn. Tre belaj bonstilaj poemoj originalaj, pri nia afero esperanta, pri la amo, la arbaroj, kaj la diversaj vivadaĵoj, kiuj provizas temetojn por tre dolĉaj melodioj. La esperantistaro rimarkos tre diversajn ritmajn verskonstruojn, kiuj bone montras la taŭgecon de nia lingvo por la poezio.

MISTERA KRIMO. Amuza komedieto, aranĝita de Mikaelo Cases, redaktoro de "Tutmonda Espero." Prezo, 40 sd.; 37 paĝojn. Aĉetebla ĉe la aranĝinto, ŝtrato Salmeron 229 4^o, 2^o, Barcelona, Hispanujo. Ĝi estas ja tre amuza kaj genie verkita, sed ĝiaj gramatikaj formoj ne ĉiufoje similas al tiuj de la Fundamento.

SALOME: Unuakta dramo de Oscar Wilde, lerte tradukita de H. J. Bulthuis, Amsterdamo, Nederlando; 39 p. Tiu konata emociaĵo koncernas la tempon de Sta. Johano la Baptisto, kies kapon la sangsoifa princino Salome venĝe ricevas, pro lia rifuzo submetiĝi al ŝiaj ĉarmoj kaj petegoj.

FORMORTINTA DELSUNO: Flandre verkita de Rene Vermandere; tradukita de Oscar van Schoor. Presita ĉe Vondelstrato 20, Antverpeno, Belgujo; 118 p. La intereseĝaj spertoj kaj pensoj, seriozaj kaj humorplenaj, de mortinta bakisto, de la mortlita tempo ĝis la enterigo, liaj nevidataj vizitoj en tiuj malmultaj tagoj, al la najbaroj, kaj la diversaj okazintaĵoj funebraj pri li. Tre meritinda kaj imitinda estas ĉapitro da notoj por alinaciuloj, farite tiel plena, ke eĉ orientanoj povas kompreni la aludojn al flandraj kutimoj kaj komunaj diroj.

The Peace Pipe

Angla gazeto — de Charles Eugene Banks — P.-I. Building, Seattle, U. S. A. Sendu du respondkuponojn (aŭ dek cendojn) kaj ricevu returne specimenan ekzempleron kune kun dek "Little Hierograph" poŝtkartoj. Tiam vi povos envicigi vin en tutmondan movadon por konservi la vivon de la birdoj, bestoj, fiŝoj, arboj, floroj. Oni konsentos liberalan rabaton al agentoj.

ESPERANTA PRESEJO

“GLANO”

Ĉiuspeca Moderna Presaĵo nun estas havebla ĉe
la supre nomita Presejo.

JUS APERIS

“La Esperanta Kunulo”

Lernolibro de la Lingvo Esperanto
En Angla Lingvo por Anglaj Parolantoj

Verkita de S-ro. J. W. Wood

Enhavas plen n gramatikon kun klaraj notoj komentaj;
simplajn klarigojn de reguloj, kun ekzemploj de sia
uzado; bone elektitan historieton por la komencanto
legi kaj studi; vortaron Esperantan-Anglan, k.t.p.
Bonege presita, en oportuna poŝa formato, kaj estas
vendata je la malkara prezo de 25 cendoj [50 sd.]
Mendu nun. Sin turnu al la eldonejo

ACORN PRESS

943 Commerce St., Tacoma, U.S. A.